

# Brazilei

## Interesiĝu pri viaj gelernantoj

Li vidis knaboN

int. > i =

N + i =

?!

z  
z  
z

Esperanto allogas  
infanojn, junulojn  
kaj plenkreskulojn  
en Charqueada/SP

Intervjuo  
Jair  
Salles




# ENKETOJ

Responde al la du enketoj starigitaj en la retejo de ILEI-br, de marto ĝis septembro 2006, vizitantoj lasis siajn opiniojn pri jenaj temoj:

**Por plenkreskulaj komencantoj plej taŭgas kurso laŭ:**

Rekta Metodo  
Situaci-komunika Metodo  
Tradicia-gramatika Metodo  
Dulingva Paroliga Metodo


29%  
47%  
17%  
5%



**Kiom ofte vi gvidas kurson de Esperanto?**

Unufoje semajne  
Dufoje semajne  
Trifoje semajne  
Pli ol trifoje semajne

40%  
40%  
20%  
0%



# ilei

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

Faka asocio pri instruado havanta operaciajn rilatojn kun Unesko kaj aliĝinta al Universala Esperanto-Asocio (UEA)  
[www.ilei.info](http://www.ilei.info)

# ilei BR

**Brazila Sekcio de ILEI**

**Prezidanto:** Antônio Felix da Silva

**Sekretario:** Joseo Tenorjo

**Kasisto:** Joel Afonso Francisco

**Komitatano:** Marcos Zlotovich

[www.ileibr.org](http://www.ileibr.org)

[geinstruistoj@ileibr.org](mailto:geinstruistoj@ileibr.org)

Rua Eng. Francisco Azevedo, 243  
05030-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telefakso: 11 3873 8080

## Brazilei

Aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata de Brazila ILEI-Sekcio

**Ĉefredaktanto:** Joseo Tenorjo

**Kontakto:** [revuo@ileibr.org](mailto:revuo@ileibr.org)

**Grafikarangō:** Joseo Tenorjo

**Reviziantoj:** José Dias Pinto kaj Osmar da Silva Alves

**kunlaboris en tiu ĉi numero:** Jair Salles, Antônio Felix da Silva, Sylla Chaves, Luiz Guilherme Souto, Osmar da Silva Alves, Paulo Sergio Viana, Ulysses Baldez

**Kuneldono:**

Eldonejo Korczak



Editora Korczak



## Enhavo

Kara Instruist(in)o	
<b>Fordonu vin Ame</b>	04
Parolo de spertulo	
<b>Jair Salles</b>	06
Parolo de la sekciestro	
<b>Valoro de Instruado</b>	14
Enklasaj Travivaĵoj	
<b>Interesiĝu pri viaj lernantoj</b>	16
Kiel Funkcias "Miksa Metodo"	12
William Auld	22
Premio Cigno: Projekto Nesto	24
Pri Tradukarto: naŭ Konsiloj kaj unu Preĝo	28
Neordinara Bebo	30
Sindediĉe kaj kreeme instrui	31
Esperanta Simpleco	32
<b>Notinde</b>	21
<b>El popola Saĝo</b>	26
<b>Konkurso</b>	34



# Fordonu vin Ame

Kun granda plezuro ni akurate liveras al vi la duan numeron de Brazilei. La lanĉo de la revueto, en la pasinta aŭgusto, naskis simpatian ĉe la membroj de ILEI-br, kio kuraĝigis nin iom investi en ĝin. Sekve el tio, la publikigaĵo jam havas propran retejon kie la legantoj povas verke interagi per unu el ĝiaj jam funkciantaj rubrikoj. Jen plia kanalo kreita por vi kiu amas instruadon. Vizitadu ĝin! Ju pli vi ĝin vizitos, des pli enhave riĉa Brazilei revenos en vian lernoĉambron...

En tiu ĉi numero sperte parolas unu el la brazilaj pioniroj pri elfarado de lernolibroj, nome Prof. Jair Salles el Rio (p. 6).

Pro manko de spaco ni aperigos en la sekva numero leciono-specimenon surbaze de unu el liaj lernolibroj.

Psikologio ludas gravan rolon ene de lernoĉambro. Ĉu ni instruantoj atentis pri tio? Foje ni estas tiel ravitaj pri la perfekteco de la instruata lingvo, ke ni apenaŭ atentis al la gelernantoj kaj perfektigo de ties lingvosocioj... Sur paĝo 16 vi trovos specialan raporton pri aplikado de **Neŭrolingvistika Programado** en lernoĉambro, kiun ni preparis por vi interesataj iel mildigi lecionrezignon flanke de gelernantoj.



# Instruist(in)o

Konatiĝu kun **Cecilia** (p. 20) per bildstrioj elpensitaj kaj desegnitaj de la kartunisto Ulysses Baldez. Cecilia estas lernema kaj observema knabino havanta nevideblan amikinson, Sofia, kun kiu travivas plej amuzajn kaj instruajn petolaĵojn.

Petoj por akiro de la verko *“Manlibro pri Instruado de Esperanto”* daŭre atingas nian sektion. Dum permeso de la internaciaj eldonantoj por ĝia presado en Brazilo ne venas, profitu por legi nian sugeston *“Manlibro de Pluvivado por la Privata Lingva Instruisto”* (p. 25).

Fordonu vin al la ĉarmo kaj koncizeco de proverboj (p. 26). La Esperanta Proverbaro estas didaktika trezoro alirebla al aŭdacaj instruantoj kiuj kutimas spici siajn lecionojn per ili. Provu ankaŭ vi po unu proverbo lecione kaj poste raportu al ni pri la sperto.

Neeviteble ĉiu instruisto jam vidis sin antaŭ la peniga tasko traduki ion el sia nacia lingvo al Esperanto aŭ inverse. La tradukinto de *Postmortaj Rememoroj de Brás Cubas*, Paulo Sergio Viana, prezentas ĉinumere (p. 22) naŭ konsilojn kaj unu preĝon pri tradukarto.

Laste, kunfunebru la plej aŭdacan el niaj poetoj (p. 22) kaj aŭdacu ankaŭ vi: malfermu vian lernoĉambron al la riĉa literatura trezoro de Esperanto!

Ĝuidan legadon kaj Novjaron!



## Intervjuo

# Parolo de

**L**a 5-leciona enkonduka kurso de la aŭtoro de “*Minicurso de Esperanto*”, Prof. Jair Salles, altiras la atenton ne nur pro la alloga titolo sed ĉefe pro la kreema eltrovo de simpla kaj praktika paroliga lernilo. Se propagandcele dirindas, ke la kreinto de Esperanto genie resumis la gramatikon de la lingvo al nuraj 16 reguloj, oni ne povas ne laŭdi, ke la aŭtoro de la ĉisupra menciita verko lerte sukcesis resumi en 5 lecionojn la sufiĉon por esperante paroligi ordinaran lernanton. La sekreto: kombino de traduko kun konversacio dum praktikado de la lingvo, kiun li baptis kiel “Miksa Dinamika Metodo”. Efektive, kvin lecionoj povas enteni sufiĉe da sonmaterialo kaj gramatikeroj por ke iu ekparolu gramatike regulan kaj alfabete fonetikan lingvon kia Esperanto! Kompreneble se oni volas perfektigi siajn lingvosciojn, oni bezonas salti trans la 16 regulojn kaj elekti pli “seriozajn” lernilojn. La demando: kial oni ne pensis pri tio antaŭe? La respondo same simplas: la verko estas rezulto de pli ol dudek jaroj da enklasaj eksperimentoj, dum kiuj la aŭtoro restis ege okupata ellaborante la valoran verketon per kiu ankaŭ ni povas regali niajn gelernantojn. Brazilo invitas vin iom pli ekkoni pri la aŭtoro kaj lia promesdona laboro.



# spertulo

## Jair Salles



Naskiĝis en la centro-okcidenta urbo Cuiabá/MT en 1939 kaj, ankoraŭ juna, translokiĝis al Rio, kie li diplomiĝis pri la angla kaj portugala lingvoj ĉe FAHUPE, sed laboris kaj emeritiĝis kiel librotenisto (kontisto) en ŝtata entrepreno. Esperantistiĝis aŭtodidakte, en 1965, allogite de ekspozicio pri poŝtkartoj organizita de s-ano Amarílio Carvalho. Ekinstruis Esperanton en KKE (Kultura Kooperativo de Esperantistoj – Rio) kaj tri jarojn poste, opiniante tre “pezaj” la tiamajn lernolibrojn, komencis la ellaboradon de sia “Miksa-Dinamika Metodo”, kies unua presita libro aperis en 1995, post longjara eksperimentado enklasa, kun la titolo “Esperanto Conversacional” (Paroliga Esperanto). Invitata partopreni en kongresoj aŭ esperantaj aranĝoj, li ofte gvidas fulmkursojn per sia metodo aŭ prelegas pri didaktiko.

---

LERNILARO KIU KONSISTIGAS LA MIKSA-DINAMIKAN METODON: **Minicurso de Esperanto** (Enkonduka Kurso), \* **Esperanto Conversacional** (Baza Kurso), **La Konversacia Klubo** (Perfektiga Kurso) kaj **La Reveno** (Progresiga Legolibro)

(\* *Lernolibro jam adaptita al la hispana de s-anino Deolinda Vera Lopez.*)

**Brazilei:** Kiuj pedagogiaj esploroj plej kontribuis al la ellaborado de via didaktika verkaro?

**Jair Salles:** Miaj “pedagogiaj esploroj” estas, grandparte rezulto el analizo pri la verkoj, per kiuj mi mem provis lerni Esperanton (en 1965, aŭtodidakte), kiel “**Primeiro Manual de Esperanto**” kaj “**Esperanto sem Mestre**”. Mi ankaŭ analizis la lernolibron “**Junul-kurso**”, kiu, tiutempe, estis la plej uzata en nia Kooperativo, en Rio. En ĉiu el ili mi trovis, kompreneble, ion bonan, kion poste mi provis utiligi en mia estonta metodo. Sed, kontraŭe, mi provis ŝanĝi la (multajn) punktojn, kiujn mi opiniis ne facile kompreneblaj por la plejmulto el la lernantoj. La ĉefa principo, laŭ mi, estas tiu, ke la plej taŭga sistemo estus ia “miksa metodo”, t.e. kombino de *traduko* kun *konversacio* por ke la lernado estu pli facila al kiel eble plej multe da lernantoj — ĉar, per aliaj metodoj, la rezigno de lernantoj estis tre granda. Iam s-ano Carlos Lima Melo diris al mi, ke li legis ie, ke iam, en Eŭropo, en iu kongreso pri instruado de fremdaj lingvoj (ne pri Esperanto), oni konkludis, ke oni devus praktiki *konversacion* en ĝiaj ĉefaj tri aspektoj, t.e. la kapabloj “respondi” (la plej facila), “demandi” (ne tiel facila) kaj “rakonti” (la plej malfacila). Do, dum pluraj jaroj de eksperimentado, mi provis ellabori la tri specojn de “parolaj ekzercoj”, nomitaj, respektive, “Respondi”, “Demandi” kaj “Rakonti”, kiel oni povas vidi ĉefe en nia lernolibro “*Esperanto Conversacional*” (Baza kurso).



**Primeiro Manual de Esperanto**, adaptita el la franca al la portugala de I.G. Braga, estas la plej furora lernolibro eldonita en Brazilo, kies eldonkvantoj jam superis la 10-an eldonon kun pli ol 200 mil ekzempleroj presitaj.



#### **Esperanto sem Mestre**

pionira didaktika libro — verkita en 1937 unue de I.G. Bragas, poste funde modifita de F.V. Lorenz kaj sekve pliampleksigita de Porto C. Netto — kiu, malgraŭ la paso de la jaroj, ankoraŭ allogas lernemajn uzantojn de la lingvo.

#### **Junul-kurso**

rektmetoda lernolibro por enklasa uzo eldonita de SAT-Amikaro en 1952 kaj ankoraŭ alloga laŭ kelkaj aspektoj.





**Brazilei:** Enkonduka Kurso kun nuraj kvin lecionoj, kiel proponas via libro *“Minicurso de Esperanto”*, pli kaj pli altiras la atenton de la instruistaro. Ĉu temas pri originala koncepto baki novajn lernantojn?

**Jair Salles:** Vere, lernolibro nur 5-leciona povas pli allogi novajn lernantojn. Sed la ĉefa motivo estis la jena. Kiel dirite en la antaŭparolo de la *“Minicurso”* mem, ni rimarkis, ke la lernolibro *“Esperanto Conversacional”* donis sufiĉe bonajn rezultojn por la Baza Kurso. Sed ĉiam estis iu nombro da lernantoj, kiuj ne estus “preparitaj” por la Baza Kurso — kaj ili do bezonus ian “Enkondukan Kurson”, kiel estis la poste ellaborita *“Minicurso”*. Kaj fakte montriĝis ke la *“Minicurso”* *preparas* por la Baza Kurso, ĉefe por *konversacio*. Teorie, oni povus ĝin instrui en 5 sinsekvaj tagoj de unu nura semajno. Sed, preferinde, oni devus ĝin instrui en unu monato, kun du lecionoj (de 1 ½ horo). Okazas ke, kvankam ĝi estas tre resuma, tamen ĝi donas la esencon de ia bona “Baza Kurso”, ĉar en ĝi estas donitaj *tri* ĉefaj punktoj de la lingvo: (1) la tuta sistemo de la *prononco* (kun laŭnecesa indiko de la “figura prononco”, en la *vortaretoj* de la lecionoj mem); (2) ĉiuj demand-vortoj (kiel: *ĉu, kiu, kio, kie, ktp.*), kiuj, cetere, konsistigas la bazon de *konversacio* mem; (3) kaj ĉiuj simplaj verbo-finaĵoj (kiel: *as, is, os, ktp.*). Krome, en la “Suplemento” de la *“Minicurso”*, prezentiĝas iu *resuma versio* de la “16 Fundamentaj Reguloj”. Ankaŭ aperas konciza, sed kompleta listo de la Afiksoj (sur unu sola paĝo). Konklude: temas do pri resuma, sed sufiĉe “serioza” materialo.

**Brazilei:** Ankoraŭ pri via furora *“Minicurso de Esperanto”*: via opinie, kiu(j)n parto(j)n de la libro ordinare kursgvidantoj bone uzas kaj kiu(j)n ili misuzas?

**Jair Salles:** Bedaŭrinde la plejmulto el la instruistoj neglektas la uzon de la “Kontrol-Karto”, ĝin opiniante nenecesa... Sed, post kiam la instruistoj — kaj la lernantoj — provas ĝian uzon, ili konstatas, kiom la “Kontrol-Karto” povas fari la lernadon multe pli *rapida* kaj *sekura*. Normale, la lernanto devas prepariĝi, hejme, pere de la “Kontrol-Karto” (en malmultaj minutoj). Sed kiam la

hejma (aŭ enklasa) trejnado per la “Kontrol-Karto” ne okazas, la praktiko de konversacio en la klaso fariĝas ne tiel facila, kiel ĝi povus esti. Kaj, sen la ĝusta trejnado de konversacio en la klaso, ĝenerale ŝajnas, ke la materialo de la leciono estas tre malmulta. Kaj, tiam, la instruisto emas “plenigi la tempon” per diktaĵoj kaj aliaj skribaj ekzercoj, kiuj, laŭ nia sperto, estas ne tiom necesaj en lingvo fonetika kaj regula, kiel Esperanto. Oni rimarku, ke la *emfazo*, en la tri libroj de nia kompleta metodo, estas la trejnado de *konversacio* — ĉar skribajn ekzercojn la lernantoj povas fari eĉ solaj, hejme...

**Brazilei:** Vi disponigas avangardan instruilon sed ŝajne iom malzorgas la flegadon de kursgvidantoj kiuj jam uzas aŭ pretas ĝin uzi. Ĉu ekzistas iu trejnkurso por tiaj instrua(o)ntoj?

**Jair Salles:** Ĉio estas afero de tempo. Nur por elfari la lernolibron de la Baza Kurso (“*Esperanto Conversacional*”), ni bezonis ĝin eksperimenti, per kserokopiitaj libretoj, dum ĉirkaŭ 20 jaroj. Por la Perfektiga Kurso (titolita “La Konversacia Klubo”), ni bezonis ĉirkaŭ 5 jaroj. Sed por la “*Minicurso*”, pro la akumulita sperto, ni bezonis nur unu jaron por ellaboro kaj eksperimentado en klaso. Krome, ni ankaŭ elfaris progresigan *legolibron*, titolitan “La Reveno”, en la lastaj jaroj (sed ĉi tiu ankoraŭ estas uzata en formo de kserokopiita libreto). Tamen, por la instruistoj estas, en ĉiuj niaj libroj, *resumo* pri la teoria bazo de la Metodo, krom Instrukcioj por la instruistoj kaj por la lernantoj, kio, iel reprezentus veran koncizan kurseton de didaktiko. Tamen, kiel eble ne tre malproksime, ni intencas prepari ian lernolibreton por instruistoj, kun materialo simila al tiu supre aludita, sed kun kelkaj pliaj detaloj. Verŝajne ĝia titolo estos “Baza Didaktiko de Esperanto — laŭ la Miksa-Dinamika Metodo”.

---

**“Traduko de teksto de la leciono ne malhelpas la regadon de konversacio mem, kiel povus supozi la plej rigoraj adeptoj de la Rekta Metodo.”**

---



Prof. Jair Salles dum leciono

**Brazilei:** Kial vi decidis lokigi la protagonistojn de viaj tri libroj en esperanta medio?

**Jair Salles:** Kelkfoje oni demandis al mi: “Kial la esperantistoj ne adaptas al Esperanto bonajn librojn jam ekzistantajn por instruo de la angla, franca, hispana, ktp?” Tiam mi

rimarkigis al ili, ke la “universo” de la naciaj lingvoj estas bazita ĉefe sur tre ĝeneralaj temoj, kiel: “Ĉe la doganejo”, “Ĉe la poŝtoŭficejo”, “Ĉe la hotelo”, ktp. Kiel ni scias, en tiuj lokoj, Esperanto ankoraŭ ne estas ofte uzata; tamen la lingvo estas tiel logika laŭ sia strukturo, ke eĉ sen studi dialogojn specifajn pri tiuj temoj, la normala esperantisto kapablos eventuale komunikiĝi pri tio. Do, mi pensis: kial ne ekspluati, en niaj metodoj, ĝuste la situaciojn de nia interesa “Mondo de Esperanto”? Krome, farante tion, oni agas praktike kaj realisme, ĉar jam dum la kurso, la lernanto sentas la plezuron ekkomunikiĝi pri la ĉiutagaj aspektoj de la vivo en la klaso, en la Esperanto-klubo kaj, ĉefe, en niaj tiom agrablaj renkontiĝoj kaj kongresoj. Jam pluraj el niaj plej bonaj lernantoj, kun nur kvar aŭ ses monatoj da studo, sukcesis interparoli sufiĉe flue kaj libere, per simpla Esperanto, en la aluditaj eventoj. Sed, kiel jam dirite, tiu sukceso multe dependas de la *emfazo*, kiun la instruisto donas al la jam cititaj “parolaj ekzercoj” de la lecionoj.

**Brazilei:** La tekstoj, ekzercaro kaj gramatika enhavo de viaj du unuaj libroj estas homeopatie elpensitaj kaj tajle ellaboritaj. Krome, la tria libro kaŝas praktikajn solvojn por kelkaj tiklaj lecioneroj pri kiuj kutimas stumbli multaj instruantoj. Laŭ via opinio, ĉu la uzantoj de viaj libroj konscias pri tiaj ecoj?

**Jair Salles:** Fakte, en ĉiuj niaj libroj, ni provis faciligi gramatikajn punktojn pere de specialaj “artifikoj”. Kurioze estas ke, kiam la lernantoj eltrovas malfaciletojn en la libroj, ili tuj *plendas* al la instruisto — sed, kiam ĉio “glate iras”, ili ĝenerale emas simple *diri nenion*. Ŝajnas do ke silento estas (*Daŭrigota sur paĝo 13*)

# KIEL FUNKCIAS LA “MIKSA METODO”(\*)

J. Salles

## ĈEFAJ METODOJ

Oni povas dividi la ekzistantajn metodojn por instruado de lingvoj en tri grandajn tipojn: Klasika Metodo, Rekta Metodo kaj Miksa Metodo.

La Klasika Metodo, kiu estas la plej malnova, uzas *tradukon*, sed *ne* uzas *konversacion*. La Rekta Metodo (pli moderna) estas la kontraŭo de la antaŭa, ĉar ĝi uzas *konversacion*, sed *ne* uzas *tradukon*. Kaj la Miksa Metodo — kiun ni adoptas — uzas, laŭ nia opinio, la plej bonan el la du sistemoj, kiuj ĝin antaŭis, t.e. ĝi kombinas la uzon de *traduko* kun *konversacio*.

## “MIKSA METODO”

Resume, en nia versio de la Miksa Metodo (kiun ni nomas “Miksa-Dinamika Metodo”), unue la lernantoj, en grupo, sub gvido de la instruisto, faras la *parolan tradukon* de la teksto de la leciono kun helpo de la respektiva *vortareto*. Poste, oni praktikas la *konversacion*, ĉefe pere de la demandoj de la “demandaro” de la leciono mem — tiam jam *pensante* kaj *parolante* “rekte” en Esperanto.

**RIM.** — *Ni uzas tradukon, ĉar multaj (inteligentaj) lernantoj ne kapablas lerni sen tiu helpo. Kaj notu ke, nuntempe, ankaŭ kelkaj gravaj kursoj de la angla, kiel “Fisk” kaj “Wizard”, uzas tradukon — sed, kompreneble, en maniero adekvata kaj ŝparema. Kaj ankaŭ notu ke, en la horo de la praktikado de “konversacio”, niaj lernantoj, ĝenerale, respondas tuje kaj flue al la demandoj — sen rigardi al la respondoj presitaj en la “demandaro” de la leciono. Tio pravas, ke la uzo de (parola) traduko de la teksto de la leciono ne malhelpas la regadon de konversacio mem (kiel povus supozi la plej rigoraj adeptoj de la Rekta Metodo).*

## “MEKANISMO” DE KONVERSACIO

Kiel oni povas observi, *konversacio* — en iu ajn lingvo — konsistas, ĝenerale, el nur tri ĉefaj kapabloj: respondi, demandi kaj rakonti. Pro tio, la trejnado de konversacio en la klaso ne devas konsisti el nur sporadaj kaj “liberaj” *demandoj*, farataj de la instruisto al la lernantoj — sed ĝi devas konsisti el “parolaj ekzercoj” pri la cititaj tri specifaj kapabloj uzataj en konversacio, nome: respondi, demandi kaj rakonti, kiel taŭge kaj abunde esploritaj ili estas en la Miksa Dinamika Metodo.

(\*) Tiu ĉi teksto estas resuma klarigo pri la funkciado de Miksa Metodo. Pli da detaloj oni trovas en ĉiuj libroj mem de la serio.

### PAROLO DE SPERTULO: Jair Salles (daŭrigo)

vere bona aprobo... Laŭ nia sperto, la lernantoj ĝenerale trovas, en Esperanto, 7 “pli delikatajn” gramatikajn punktojn, por kiuj ni provis uzi “specialajn artifikojn”. Tiuj estis ĝenerale prenitaj el klasikaj gramatikoj aŭ lernolibroj — en kiuj, tamen, tiuj klarigoj ne ŝajnis al ni sufiĉe klaraj por la plejmulto el la lernantoj. Tiuj pli delikataj punktoj estis analizitaj ĉefe en la “Gramatika Suplemento” de la lernolibro “La Konversacia Klubo” (Perfektiga Kurso). Ili estas la jenaj: (1) akuzativo; (2) korelativoj; (3) prepozicioj; (4) participoj; (5) refleksiva pronomo “sia”; (6) sufiksoj “ig/iĝ”; kaj (7) aglutino propra al Esperanto.

**Brazilei:** Por vi, taŭge instrui estas...

**Jair Salles:** Por taŭge instrui, la instruisto devas provi “forgesi” pri sia sufiĉe granda kono pri la lingvo kaj, anstataŭe, li devas imagi sin en la situacio de la lernanto. Resume: taŭge instrui estas simpatii al la lernanto... Alia iom ironia aksiomo pri la sama temo estus la jena: “Ne sufiĉas *instrui*, sed necesas *lernigi*...”

# Parolo de

## Valoro de Instruado

**I**nstruado estas grava afero. Tiom ke la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj garantias al ĉiuj la rajton al edukado surbaze de fundamentaj principoj kiel respekto, kompreno, toleremo kaj amikeco. Ankaŭ la Universala Deklaro de Unesko, en sia paragrafo pri kulturo, detale reguligas protektadon i.a. de kultura kaj lingva diversecoj, temo kiu rekte koncernas al la internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj sekve ankaŭ al ties landaj sekcioj.

Kiel instrufaka reprezentanto de ILEI en Brazilo, la Brazila ILEI-Sekcio pretas ricevi viajn sugestojn kaj ankaŭ apogi iniciatojn iel rilatantajn al la prioritatoj de nia laborplano por la sekvaj jaroj, nome intrukapablo de

# la sekciestro



kursgvidantoj de Esperanto. Antaŭ ol provi diskonigi Esperanton en publikaj lernejoj ni klopodu al tio ke preparitaj instruantoj sin prezentu. Jen defio invitanta nin al kunagado.

Kion povas fari ILEI-br por plenumi tiujn prioritatojn? — vi povas demandi. Kiel unua paŝo, la Sekcio dissendas senpage al siaj membroj la trimonatan pedagogian revueton Brazilei. Per ĝi ni celas helpi kaj kuraĝigi kursgvidantojn de Esperanto en la malfacila sed plezuriga tasko instrui Esperanton. Tial ni invitas vin malfermi vian lernoĉambron al Brazilei. Kiel dua paŝo, plene funkcios ekde la venonta jaro libroservo kiun ni speciale preparas por vi kun importitaj kaj memeldonitaj verkoj. Multon pli ni pretas fari, sed solaj estas ege malfacile. Tial ni bezonas, ke vi laŭeble apogu nian agadon kiel membro de ILEI-br (legu alkroĉitan aliĝproponon), kunlaboranto aŭ simple kiel leganto de Brazilei. Ni kaptas la okazon por inviti vin ankaŭ partopreni en la konkurso “Izoliteco... forviŝu ĉi ideon!” sur la paĝo 34.

Laste, la teamo de la Brazila ILEI-Sekcio deziras al ĉiuj geinstruistoj kaj legantoj de Brazilei gajan kristnaskon kaj novan jaron kun amo, paco kaj plena lernoĉambro!

## Interesiĝu pri viaj Lernantoj

APLIKADO DE NEŬROLINGVISTIKA  
PROGRAMADO EN LERNOĈAMBRO

Parto 1





# Travivaĵoj

Oni rezignas ĉeesti lecionon pro diversaj kialoj: malsano, laboro, transloĝiĝo, amindumo, familiaj premoj k.a. Tamen la plej ordinara kialo de lecionrezigno estas manko de interesiĝo. Kutime kursgvidantoj vidas mankon de interesiĝo nur ĉe la lernantoj. Ni invitas vin iom pensi pri alia ebleco, nome pri manko de interesiĝo flanke de kursgvidantoj mem.

Instrui estas esence prezenti modelojn. Ne nur tiujn lingvajn, sed ankaŭ tiujn pri konduto. Por novaj kursanoj, ne gravas la aĝo, la instruanto estas ĉiam modelo-prezanto: de korekta prononco, sekvendaj frazeroj, imitindaj frazkonstruoj kaj legindaj tekstoj. Samkiale lernantoj imitas ankaŭ bonajn kaj malbonajn kutimojn de sia instruanto. Ili pretas porti hejmen lernotaskojn, ekzemple, se la instruanto insistas pri tio, sed ili ankaŭ tuj rezignas pri ilia plenumado, se ili perceptas, ke la instruanto malzorgas pri korektado. Tiaj detaloj estas pli facile perceptataj de lernantoj ol de instruanto, ĉar la ĉefa rolo de lernanto estas atente observi i.a. sian instruanton!

Lernu ankaŭ vi observi viajn lernantojn. Anstataŭ turni vian dorson al ili por plenigi la tabulon per senfinaj gramatikaj reguloj, turnu vin al ili kaj komencu de nun skribi la lernotaĵojn en iliaj koro kaj cerbo per helpo de novaj principoj proponataj de Neŭrolingvistika Programado aplikata al instruado.

Se resume diri, Neŭrolingvistika Programado (aŭ simple NLP) estas principaro celanta plibonigon de ies lerteco dum iu laborplenumo. Ni spertas travivaĵojn per niaj sensorganoj, nome vidado, aŭdado, tuŝado, flarado kaj gustumado, kiuj en NLP nomiĝas "Reprezentaj Sistemoj" respektive: vida, aŭda kaj kinesteza (reprezentata de la ceteraj sensoj kaj sensacoj). Ili estas la kvin kanaloj per kiuj ni perceptas la mondon ĉirkaŭ ni kaj per kiuj ni konstruas nian bildmondon internan kaj eksteran.

Ĉiuj ni uzas unu el tiuj kanaloj pli ol aliaj, kio igas nin pli vid- aŭd- aŭ kinestezkapablaj. Sekve, homoj kun vida reprezento-sistemo emas raportii aŭtoakcidenton per tiaj vortoj: "*Mi **vidis** ĉion per miaj propraj **okuloj!** Mi **vidis** kiam la **nigra** aŭto **avancis** la **ruĝan** lumon! Estas **klare** ke li **kulpas!**" Antaŭ la sama okazaĵo aŭda reprezentanto tiel sin esprimus: "*Mi memoras **aŭdi** nur **hupon** kaj tuj poste **fortan bremsadon!** Tiam okazis la neeviteblo: **KRAŜ!** La **bruego** similis al **eksplozo!**" Kinestezulo siavice dirus: "*Estis **terure...** mi **sentis** **angoron**, **premon** tie ĉi en la **koro** kiam mi **antaŭsentis**, ke la **fatalo** okazos... kaj fakte okazis... Oni povis **flari** konfuzon en la aero!"***

## Serĉe de adekvata kanalo

La parto kiu nin interesas estas la jena: se instruisto estas aŭda reprezentanto, nome se li uzas nur la parolon (eĉ tabulon li apenaŭ uzas), tiam ekestos efika komunikado nur kun aŭdaj lernantoj. La ceteraj lernantoj, reprezentantoj de vida kaj kinesteza sistemoj, devos fari iom da peno por akompani la lecionon. Se la instruisto insistas per tiu ekskluziva kanalo, plej ofte okazas, ke vidaj kaj kinestezaj lernantoj laciĝas akompani la lecionojn kaj sekve rezignas pri ili. La instruisto kulpas la metodon kaj nova ciklo ripetiĝas.


### Fondintoj de NLP



**John Grinder**, lingvosciencia profesoro en la Departemento pri Lingvistiko ĉe Universitato Santa Kruco, Kalifornio, komence de la 70-aj jaroj



**Richard W. Bandler**, tiama studento pri psikologio en la sama universitato



### Okaze de aliĝo al la kurso:

disdonu slipon kun  
informeto pri  
kompleta nomo,  
adreso, laborfako,  
naskiĝtago kaj  
ŝatokupoj.  
Ekinteresiĝu pri viaj  
lernantoj ekde la  
unua leciono!



### Dum la kurso:

Se la metodo permesas, kiom eble klarigu lecionerojn per ekzemploj koncernantaj al la vivsfere de la lernantoj. Sciante ke iu lernanto en la klaso havas filmspektadon kiel preferatan ŝatokupon, anstataŭ diri/skribi: “Petro vidis grandan leonon”, prefere diru/skribu: “(nomo de la lernanto) vidis interesan filmon”. La aludita lernanto restos kontenta ke la instruisto memoris pri li kaj pli atentis al la leciono! Se la memorigito entuziasme interrompos la lecionon per “Kiel oni diras ‘filme legendado’ en Esperanto?”, faru plian surprizon: regalu la demandinton en la sekva leciono per kinvortareto preparita de vi mem...

### Kiel profite uzi Neŭrolingvistikan Programadon en lernoĉambro

Ideala leciono estas tiu en kiu instruisto partoprenigas la lernantojn per kiel eble plej multaj reprezentaj sistemoj. Tio signifas, ke la instruisto (pli ol la lernantoj) devas klopodi ekuzi la ceterajn perceptokanalojn kaj laŭnecese adapti sian instruilaron por ebligi adekvatan komunikadon kun la kursanoj. Plie: la instruisto bezonas trejniĝi por percepti kiun kanalon ĉiu lernanto plej uzas. Malfacila tasko por instruistoj kiuj eĉ malkonas ŝatokupojn kaj naskiĝtagojn de siaj lernantoj! Post iom da trejnado, tamen, la instruisto kapablos plibone *(Daŭrigota sur paĝo 20)*



### Post la kurso:

Tenu la lernantojn informitaj pri la aktivadoj de via grupo.  
Laŭeble plu sendu al ili (se rete despli bone, ĉar tute senkoste) informilojn, invitilojn kaj datreven-mesaĝon. Igu ilin senti ke, malgraŭ la fino de la kurso, vi daŭre interesiĝas pri ili. Tiel farante, ne miru se iun tagon vi havos la agrablan surprizon surstrate esti vokita per iu varma kaj sincera “Instruisto!”

elturniĝi el simplaj situacioj kiel ekzemple kontentigi peton de lernanto ne kompreninta antaŭan klarigon pri iu lecionero. Se por la unua klarigo la instruisto (aŭdulo) uzis reprezentan sistemon ne tute kongruan kun tiu de la lernanto (vidulo), foje sufiĉas refari la klarigon per alia kanalo. Alivorte, se instruisto unuafoje nur parole klarigis iun lecioneron, laŭpete li duafoje ĝin klarigu per desegno, grafikaĵo aŭ skribaĵo sur la tabulo. Eĉ post tia ekzercado, se lernantoj ial bezonos forlasi la kurson, la agrabla kunvivado enklasa restos por ĉiam ĉe ili kiel modelo de vivleciono.

---

---

### Kion legi plu:

**Acorda Profesor – PNL na Arte de Educar**, Sirlei

Bernardes – Editora Komedi, Campinas, 2003

**Introdução à Programação Neurolingüística** –

Nelson Piletti. Editora Summus, São Paulo, 1995

### Fontoj:

**Neŭrolingvistika Programado por Efika Komunikado**, David Bianchini

– Kultura Centro de Esperanto, 1997 (Serio Kulturaj Kajeroj, n-ro 1)

<http://www.seducaoecomportamento.com.br/saladeaula05.htm>

[http://eo.wikipedia.org/wiki/Ne%C5%ADro-lingvistika\\_programado](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ne%C5%ADro-lingvistika_programado)

---

---

### Cecilia - Ulysses Baldez



### KURTA KINOESPERANTO FESTIVALO

Triesta Esperanto-Asocio, en Italio, invitas amatorajn kaj profesiajn filmproduktantojn partopreni en Internacia Kinokonkurso kun libervola temo kaj 15-minuta tempodaŭro. Ĉiuj konkurantaj verkoj estos prezentataj al publiko, kiu ankaŭ voĉdonos por la plej bonaj kurtofilmoj, okaze de la Semajno de Internacia Amikeco (SIA) okazonta de la 19-a ĝis la 25-a de februaro 2007. La unuaj tri kurtofilmoj klasifikiĝintaj ricevos premion en formo de pokalo, plato kaj libroj. La verkoj ital- kaj esperantlingvaj, aŭ alilingvaj sed kun subskriboj ital- aŭ esperantlingvaj, estu sendataj en formo de DVD aŭ VHS ĝis la 15-a de decembro al la adreso: ESPERANTO TRIESTE C.P. 601 — 34132 Trieste, Italio. Por pliaj informoj iru al la retejo: [www.blog.ialweb.it/esperantotrieste](http://www.blog.ialweb.it/esperantotrieste)



### BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2007


La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 58-a fojo. La rezultojn oni anoncos en la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj en ajna formo. Oni rajtas sendi po tri konkursaĵoj al jenaj kategorioj: poezio, prozo, teatraĵo, eseo, kanto, filmo kaj Infanlibro de la Jaro. La verkojn oni sendu plej laste la 31-an de marto 2007 al la adreso: Belartaj Konkursoj de UEA ĉe Michela Lipari, Viale Giulio Cesares 223, IT-00192 Roma, Italio aŭ rete [michela.lipari@tiscali.it](mailto:michela.lipari@tiscali.it)

### ESPERANTO EN LA BIBLIOTEKOJN

Kultura Kooperativo de Esperantistoj, en urbo Rio-de-Ĵanejro, ekspedis plian libro-pakaĵon kadre de sia kampanjo **“Esperanto en la Bibliotekojn”**. Ĉifoje la libropakaĵo entenantanta 10 titolojn sin direktis al la Municipa Biblioteko *Mâncio Lima*, en ŝtato Acre, okcidenta parto de Brazilo. La kampanjo estis lanĉita en julio 2001 kaj jam ekspedis 52 libropakaĵojn al pluraj enlandaj kaj eksterlandaj bibliotekoj. Ĝin subtenas deko da brazilaj esperantistoj per regulaj mondonacoj. Interesatoj monsubteni la projekton, bonvolu kontakti Kulturana Kooperativon de Esperantistoj ĉe [esperanto@kke.org.br](mailto:esperanto@kke.org.br)

# William Auld

Al vi, karega poeto, kiu aŭdacis konkeri Nobel-premion ne antaŭe konkerinte niajn lernoĉambrojn, ni honte sed fiere vin funebras.



Eldono de 1980

**F**orpasis la 11-an de septembro la skota poeto kaj tradukisto William Auld, konsiderata la plej eminenta el la nuntempaj esperantistoj, kies literatura agado permesis lian kandidatigon al literatura Nobel-premio. Li esperantistiĝis en 1938 kaj 14 jarojn poste debutis kiel poeto antaŭ la internacia legantaro. Lia plej fama verko, **La Infana Raso**, aperis en 1956 kun postaj reldonoj, inkluzive ankaŭ en la nederlanda, portugala kaj hungara lingvoj. El liaj plej gravaj tradukoj elstariĝas la trivoluma epopeo de Tolkien (**La Mastro de l' Ringoj**) reaperonta en la venonta jaro. Aldone al lia rimarkinda agado kiel poeto kaj tradukisto, menciindas lia kontribuo al la esperanta movado kiel prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj redaktoro de la organo de UEA *Esperanto* kaj de jenaj literaturaj gazetoj: *Monda Kulturo*, *Norda Prismo*, *Fonto* kaj *La Brita Esperantisto*, kiun li redaktis dum pli ol 25 jaroj. Laste sed ne balaste, li ankaŭ populariĝis kiel verkisto de la progresiga kaj plurfoje reeldonita lernolibro **Paŝoj al Plena Posedo**.

Literatura Foiro (LF-koop).  
Svislando, 2001




Hungara Esperanto-Asocio: Budapeŝto, 1989




Sezonoj,  
1995/1997 (Serio)

Mondliteraturo: Volumo 3)





La Laguna: Stafeto, 1956



(1924–2006)

## Al mia amatino neesperantista\*

Eklerni esperanton vi evitas:  
tre bone, kara, scias mi la kaŭzon  
de tio, ke vi kvazaŭ sentas naŭzon,  
kiam mi ion esperantan citas.

Ho jes! ĉu kredas vi, ke mi ne vidas  
tiun subitan spasman spiropaŭzon?  
Pri l' lingvo sentas vi ĵaluzotaŭzon,  
ke mian amon vi kun ĝi dividas!

Kara, pripensu: ĉu ne bone estus  
se pri la aferet' vi ne kontestus,  
sed entreprenus Zamenhof-ekzercojn?

Ĉar tiam vere vivus vi pli home,  
kaj sentus kun, ne kontraŭ mi – kaj krome,  
vi poste povus legi miajn versojn.

(\*)Poemo aperinta en la antologio **Kvaropo**, 1952, per kiu sin prezentis al la publiko la fondintoj de la skota skolo: William Auld, John Dinwoodie, John Francis kaj Reto Rossetti.

## PREMIO CIGNO



**Projekto Nesto**, “la plej granda lernejo de Esperanto nuntempe funkcianta”, laŭ takso de la prezidanto de ILEI, Prof. Radojica Pretroviĉ, ricevis la premion CIGNO aljuĝitan de Universala Esperanto-Asocio (UEA) okaze de la fermo de la ĉijara 91-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta la 5-an de aŭgusto en Florenco, Italio.

Laŭ difino mem de ĝia administranto, Prof. Adonis Saliba, el urbo San-Paŭlo/Brazilo, “Projekto Nesto estas sistemo por naski esperantistojn kaj ne simple plia elektronika rimedo por instruado de lingvoj. Aldone al la lingvo, niaj ĉirkaŭ 200 instruistoj estas prezentataj al siaj lernantoj laŭ lingva kaj regiona kriterioj; krome, ili estas invitataj interagi kun la lernantoj cele transdoni al ili tiujn valorajn principojn kiujn UEA defendas kiel laborproponojn de la esperantistoj surbaze de **Manifesto de Prago** (1966) kaj **Kulturo de Paco** de Unesko”.

Al la Projekto Nesto jam aliĝis, dum ĝiaj tri jaroj de funkciado, pli ol 5000 lernantoj el 60 landoj. La projekto disponigas kursojn laŭ baza kaj daŭriga niveloj surbaze de la vaste konataj reta kurso **KAPE** de la brazila komputilprogramisto Carlos Pereira kaj legolibro **Gerda Malaperis** de la svisa psikologo Claude Piron.



Brazila Sekcio de ILEI gratulas ĉiujn kunlaborantojn kaj apogantojn de Projekto Nesto kaj deziras daŭran kaj fruktodonan rikolton.




### **Teksto de Manifesto de Prago:**

[http://www.uea.org/informado/pragm/pm\\_eo.html](http://www.uea.org/informado/pragm/pm_eo.html)

### **Teksto de Kulturo de Paco:**

<http://www.uea.org/agadoj/projektoj/manifesto2000.html>





## Manual de Sobrevivência para o Professor Particular [de Idiomas]

Maria Rita Bicudo kaj Silvia Manuela Jardim  
Eldonejo Disal, 2006 – San-Paŭlo

12x20 cm 104 paĝoj

ISBN 85-89533-44-1

Lingvo: portugala

<http://www.disal.com.br>

- ★ Mi havas privatan lernanton, kaj nun?  
Per kia instrumentado mi preparu mian lecionon?
- ★ Kian materialon mi uzu, se ĉiuj estas preparitaj cele al grupo-lecionoj?
- ★ Kiel taksu ĉu mia leciono bonas, se mi ne havas kurskunordiganton por orienti min?
- ★ Kiel mi paroligu mian vortŝpareman lernanton?
- ★ Kiel mi korektu sen ĝenado?
- ★ Kiel mi parolu pri pago al mia lernanto sen igi min senti kiel monavidulo?
- ★ Kiel mi instruu hejme ne tuŝante mian privatecon, nek permesante ke la lernanto sentu sin tia?
- ★ Kiel elturniĝi dum senlabora periodo, kiam ĉiuj libertempas kaj neniu volas lecionon pri lingvoj?

La ĉefaj demandoj kiujn alfrontas la privata instruisto de lingvoj estas leĝere kaj bonhumure prezentataj en tiu ĉi libro, kiu ankaŭ proponas praktikajn sugestojn por faciligi la ĉiutagan vivon de la instruisto. Sugestoj pri aktivadoj, pri korektado kaj taksado, pri planado kaj observado. Resume, ĝen instrumentado je granda utilo por la privata instruisto de lingvoj.

Proverboj estas frapfrazoj multe uzataj de lingvoparolantoj en la tuta mondo por koncize esprimi i.a. konsilon, admonon kaj sperton. Ordinare ili estas netradukeblaj al alia(j) lingvo(j), sed por ili troveblas ekvivalentoj en preskaŭ ĉiuj lingvoj. Aldone, oni povas adapti ilin al plej diversaj sferoj de vivagado. Brazilei elektis kelkajn tiajn diraĵojn por amuze (kaj iom pensige) redoni ilin [*ĉisube kursive signitaj*] al la legantoj.

**Kiu ripetas abunde, lernas plej funde.**

*Kiu kongresumas abunde, amikiĝas plej funde.*

**Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas.**

*Kiam per amo oni regalas, ĉiuj metodoj egalas.*

**Al tiu la sorto cedas, kiu multon posedas.**

*Al tiu la klaso kredas, kiu Esperanton posedas.*

**En propra sia domo ĉiu estas granda homo.**

*En propra via leciono zorgu pri aliula bezono.*

**Kuraĝe li staras, kiam muro lin baras.**

*Prelegon li faras eĉ se akuzativo lin baras.*

**Kiu agas afable, vivas agrable.**

*Kiu kotizas afable, esperantumas agrable.*

**Gasto agrabla estas, se ne longe restas.**

*Instruanto atenton kaptas, se instruilaron taŭge adaptas.*

**Dion fidu, sed senfare ne sidu.**

*Metodojn miksu, sed scimanke ne risku.*

**Ĉiuj milionoj konsistas el milonoj.**

*Ĉiuj lecionoj konsistas el lecionoj.*

**kiu multe babilas al si malutilas.**

*Kiu multe gramatike babilas, al leciono mem malutilas.*

**La luno ne aŭskultas, kiam la hundo ĝin insultas.**

*La klaso mutas, kiam instruisto tre balbutas.*

**Ricevi grizan haron, ne vidinte altaron.**

*Ricevi ateston, ne venkinte la alfabeton.*

**Eĉ monstron admiras, kiu ame deliras.**

*Instruiston oni pardonas, se li esperante ordonas.*

**Ne fidu amikon kiu havas jam flikon.**

*Ne fidu metodon kiu faris jam modon.*

(Fonto: Esperanta Proverbaro de L. L. Zamenhof)

## Projekto Gutenberg ankaŭ en Esperanto

Projekto Gutenberg (*Project Gutenberg* angle) estas la plej malnova stokejo de senkostaj elektronikaj libroj. La libro-kolekton prizorgas centoj da volontuloj en la tuta mondo kun la celo enkomputiligi, konservi kaj disvastigi kulture gravajn verkojn. La projekto, kies nomo omaĝas la germanan elpensinton de presmaŝino kun moveblaj tipoj, estis lanĉita en 1971 de Michael Hart, tiama studente ĉe universitato de Ilinojso, Usono. Ĉiumonate pli ol 2 milionoj da elŝutoj registriĝas serĉe de legaĵoj el inter ĝiaj 19.000 titoloj en pluraj lingvoj inkluzive de Esperanto kun preskaŭ 50 titoloj. La esperantista teamo serĉas bonajn senkopirajtajn titolojn por disdoni en la Projekto. Interesatoj kunlabori en la projekto, sendu mesaĝon al Ĝeremio Aldrich ĉe [gxeremio@greenstarmovement.com](mailto:gxeremio@greenstarmovement.com)





# Pri tradukado:

Paulo Sergio Viana

## Naŭ konsiloj kaj unu preĝo

**T**radukado estas sendanka tasko. Oni eĉ kutimas diri, ke bonaj tradukoj ne ekzistas, nur la akcepteblaj. Kaj ju pli subjektivaj la tekstoj, des pli malfacile. Oni tuj komprenu la kialon: lingvoj ne estas simetriaj, paralelaj strukturoj; ĉiu lingvo havas la koloron de la kulturo, kiu ĝin subtenas, kaj tio malpermesas, ke oni laŭvorte transmetu emocioplenajn pensojn de unu lingvo al alia. Do, oni simplece povus difini tradukarton kiel subtilan klopodon solvi ĉi tiun problemon: kiel oni esprimas tiun saman ideon en alia lingvo, tute nature?

La samo okazas, se oni tradukas al/el Esperanto, ĉar ankaŭ Esperanto kreskas ene de propra kulturo. Kaj se vi (mazoĥisme!) kandidatiĝas esti tradukisto, jen mi lasas al vi kelkajn konsilojn:

1

Legu almenaŭ unupaĝan bonan tekston en Esperanto ĉiutage, dum kelkaj jaroj; sed ne nur legu: notu la kuriozajn esprimojn, la parolturnojn proprajn al nia lingvo, la belajn frazkonstruojn, la nuancojn.

2

Klopodu ekzerce traduki el via etnolingvo frazojn de iu teksto, kiun kompetenta tradukisto jam alfrontis; komparu poste viajn solvojn kun la liaj.

3

Komencu vian praktikadon per facilaj tekstoj, ekzemple porinfanaj aŭ porkomencantaj rakontoj; evitu la aŭtorojn, kiuj havas aŭdacan, nekutiman stilon.

4

Diskutu vian tradukon kaj viajn dubojn kun viaj kolegoj kaj pli spertaj esperantistoj; se eble, starigu diskutrondon en la klubo aŭ en interreto, pri tradukaj problemoj.

5

Neniam traduku laŭvorte, sed laŭsence; se vi tradukas al Esperanto, tiam kontrolu ĉi tion: ĉu oni dirus tion en natura, normala Esperanto?

6

Traduki laŭsence kaj ne laŭvorte havas limojn: se oni tro libere ignoras iujn vortojn de la originalo, parto de la ideo foje perdiĝas, ĉar iuj "fortaj vortoj" starigas fortan impreson en la teksto, tiel ke oni devas serĉi ekvivalenton.

7

Traduku tekstojn, kiuj plaĉas al vi en la originalo; male, certe viaj sentoj malfavore reflektiĝos en la tradukaĵon.

8

Konsultu ĉiumomente bonan vortaron: vi ofte konstatos, ke vi ne konas iujn nuancojn pri tiu aŭ alia vorto.

9

Neniam prezentu por publikigo tradukaĵon sen antaŭaj revizioj: plurfoja revizio fare de vi mem, revizio fare de samlingvano kaj revizio fare de alilingva kompetenta esperantisto, kiu ne suferas la pezon de viaj idiomaĵoj.

10

Surgenue preĝu ĉiutage al via Gardanĝelo, ke li protektu vin kontraŭ gravaj eraroj; koncerne negravajn misaĵojn, rezignacie akceptu la vipadon de recenzistoj: estas neeble produkti perfektan tradukaĵon, eĉ kun la helpo de Gardanĝelo...

**PAULO SERGIO VIANA**, el urbo Lorena/SP, estas kuracisto, tradukisto kaj aŭtoro de dekoj da rakontoj kaj poemoj, kelkaj premiitaj en la beletraj konkursoj de UEA kaj de la rusa gazeto La Ondo de Esperanto. El liaj tradukoj menciindas **La Alienisto**, **Dom Casmurro** (publikigota), **La Divenistino kaj Aliaj Rakontoj**, **Postmortaj Rememoroj de Brás Cubas**, ĉiuj de Machado de Assis; **La Socia Rolo de Kromamantoj**, de Agenita Ameno, kaj **Nekonata Insulo**, de José Saramago.



# Neordinara bebo

Traduko kaj ilustraĵo: Ulysses Baldez

**L**a edzino de Nerasĝin estis tre malsana kaj mortis. Post kelkaj monatoj, Nerasĝin reedziĝis. Lia nova edzino estis vidvino. Ĝuste sep tagojn post la geedziĝo, lia edzino naskis bebon. Nerasĝin rapide vizitis bazaron kaj aĉetis paperojn, kraĵonojn, plumingojn kaj kelkajn lernolibrojn. Kiam li revenis hejmen kun ĉiuj aĉetitaj aferoj, lia edzino miregis:

“Kion vi faras? La bebo ne kapablos uzi tiajn aferojn dum longa tempo! Kial vi hastas?”

Nerasĝin respondis:

“Vi tute malpravas, karulino! Nia filo ne estas ordinara bebo. Li venis post sep tagoj anstataŭ naŭ monatoj, tial li certe estos baldaŭ preta por eklerni legadon kaj skribadon!”

*“Intermediate Stories for Reproduction”*

L. A. Hill, Oksforda Universitata Eldonejo, 1965

# Sindediĉe kaj kreeme instrui



Luiz Guilherme Souto Jardim, denaske gaŭĉa, transloĝiĝis al San-Paŭlo antaŭ dek jaroj.

Memlernanto 43-jara el kiuj 24 estas dediĉataj al Esperanto. Krom instrui, li diskonigas la lingvon per prelegoj kaj parolado en la loka radiostacio.

En urbo Charqueada [ŝarkeada], enlande de ŝtato San-Paŭlo, 30 gelnantoj ĉeestas kursojn de Esperantoj laŭ klasoj Porkomencanta (8 plenaĝuloj), Konversacia (6 gejunuloj) kaj Porinfana (16 geknaboj), gvidatajn de Guilherme Jardim. La kursejo funkcias en Societo "Spiritisma Unuiĝo de Charqueada", kiu apogas la edukan projekton.

Laŭ la kursgvidanto Guilherme, la plej maljuna lernanto estas 76-jaraĝa kaj la plej juna 9-jaraĝa. La lecionoj baziĝas sur plaĉe ilustrita lernolibro kompilita de la kursgvidanto mem laŭ principoj de rekta metodo por la praktikado de la lingvo kaj indukta metodo por la gramatikaj lecioneroj. La kursodaŭro esta sesmonata kun unufoje-semajna leciono ĉiuvendre. Ĉiu leciono daŭras unu horon kaj duono.

Pri la ekesto de sia porinstrua agado, Guilherme mem rememoras: "Unue mi sukcesis instrui nur tri personojn, sed mi ne lasis la aferon, poste mi havis la ideon instrui kelkajn malriĉajn infanojn de mia kvartalo senpage, kaj tio estis granda surprizo. La infanoj tre sin dediĉis al la studado, ili vere kredas ke la afero helpos ilin havi pli bonan sorton en la vivo. Poste la gepatroj interesiĝis pri la studado de la infanoj kaj ankaŭ komencis partopreni en la kursoj". Laste, li konfesas: "Mi faras la laboron senhelpe de la registaro kaj mi elspezas multe da mono por fari la materialon, sed feliĉe mi havas bonan financon kondiĉon"


## **Gratulon, Guilherme:**

*Per via ekzemplo ni invitas ĉiujn instruantojn malfermi sian lernoĉambron al aliaj brazilaj ĥolegoj!*



# Esperanta Simpleco

Sylla Chaves

*Ricevinte du gravajn invitojn prelegi por konsili homojn iel sin okupantaj pri la bona uzado de Esperanto, Prof. Sylla Chaves elektis la temon "Esperantonimoj kaj Esperanta Simpleco". Sekvas resumo de lia gvidteksto publikigita en la listo **Esperanto-br** je la 12-a de oktobro pasinta kun la titolo "Ni ne devas detrui la simplecon de Esperanto". Por legi la kompletan tekston vizitu* 

## UNU EL LA ĈEFAJ ATUTOJ POR LA VENKO DE ESPERANTO ESTAS ĜIA SIMPLECO

**L**a genia knabo de Bjalistoko kunigis tri ideojn, por ke nia internacia lingvo iam fariĝu la ĉefa komunikilo de ĉiuj popoloj de la mondo: (a) ĝia **NEŬTRALECO**, kiu permesas, ke ĉiu ajn homo (riĉa aŭ malriĉa, urba, kampara aŭ arbara, klera aŭ malklera, kristana, alireligia aŭ senreligia) diru fiere: "ĝi estas MIA lingvo"; (b) ĝia nuancoplena **RIĈECO**, kiu permesas traduki eĉ la plej kompleksajn verkojn de la plej profundaj mondaj pensuloj; kaj (c) ĝia relativa simpleco, kiu permesas, ke eĉ infanoj kaj malkleruloj, ie ajn en la mondo, lernu ĝin por komunikiĝi kun samnivela antipoda fremdulo. Mi substrekas la vortojn **RELATIVA SIMPLECO**, ĉar Esperanto estas lingvo, kaj lingvo estas komplika apartenaĵo de altnivelaj estuloj, rekte ligita al pensado. Kaj ni bone scias, ke kelkaj sinnomantaj CIVILIZITAJ HOMOJ neniam sukcesas lerni racie pensi. Kaj tiu, kiu ne lernis racie pensi, neniam kapablos trafe uzi iun ajn lingvon.

En kelkaj monatoj, aŭ nur semajnoj, eblas lerni Esperanton por la ĉefaj komunikaj homaj bezonoj (certe pli kompleksaj ol tiuj de abeloj, formikoj, delfenoj kaj ĉimpanzoj). Sed enprofundiĝo en ĉiujn detalojn de la Esperantaj eblaĵoj nepre postulas laboron dum tuta vivo. Evidente, tiu konstanta kaj longega laboro neprigas modestecon. Kiel ĉiuj saĝuloj, lingvaj saĝuloj ankaŭ rimarkas, ke "mi scias ĉion" estas supozo de stultuloj.

[www.br.groups.yahoo.com/group/esperanto-br](http://www.br.groups.yahoo.com/group/esperanto-br) 



## KIAL KELKAJ HOMOJ KOMPLIKAS NIAN (RELATIVE) SIMPLAN LINGVON?

En iu ajn lingvo, estas homoj, kiuj intence parolas komplike por ne esti komprenataj kaj tiel kaŝi sian malkleron. Kelkaj fakuloj, en universitataj kursoj, uzas komplikajn terminojn nur por ŝajnigi, ke iliaj instruoj enhavas ion vere novan. Kaj kelkaj poetoj supozas, ke “poeziaj vortoj” transdonas poeziecon al banalaĵoj. Tio komplikas tekstojn en multaj lingvoj, kaj Esperanto ne estas escepto.

Aliaj komplikoj estas apartenaĵo de nia internacia lingvo. Ili rezultas de intenco trompi aŭ de nesufiĉa studo de la lingvo. La ĉefa estas la aserto, ke “por ĉiu signifo estas nur unu vorto kaj por ĉiu vorto estas nur unu signifo”. Tio egalas al la diro, ke EN ESPERANTO ESTAS NEK SINONIMOJ NEK HOMONIMOJ, NEK PLURSIGNIFAJ VORTOJ. Absolute malvera aserto! Tio ne estas fakto, ne gravas, ke tio ne estas fakto, kaj la klopodoj kaŝi tiun veron nur komplikas nian lingvon. La dua konstanta komplikoj en Esperanto estas mortkondamni la prefikson MAL. Tio malfaciligas la kreon de antonimoj. Kelkaj el tiuj sinonimoj de “malvortoj” povas esti utilaj, sed la plimulto estas ĝena balasto.

Spite tiun emon kompliki, la plimulto el la komunikantoj volas fakte komuniki. Kaj por bone komuniki nepras esti simpla. Kaj internacia lingvo, kiun tre malmultaj uzas denaske, eĉ pli ol aliaj bezonas simplecon. Kaj tial, kiel instruisto, tradukanto, verkisto kaj vortaristo, mi decidis eniri la skipon de la batalantoj por la simpleco de Esperanto, kies unua partoprenanto estis Zamenhof mem.

**Prof. Sylla Chaves**, naskiĝinta en Santana do Livramento/RS, studis juron (Rio), kibernetikan pedagogion (Germanio) politikan sciencon (Parizo) kaj magistriĝis pri komunikado en *Stanfordo Universitato* (Usono). Dum pluraj jaroj li ankaŭ laboris ĉe la Organizo de UN (Novjorko) kaj Unesko (Parizo). Plurfoje premiita en la beletraj konkursoj de UEA, liaj verkoj daŭre aperas en diversaj antologioj. Krome, li estis membro de la Akademio de Esperanto (1986-1995). Lia vasta kaj pionira esperanta verkaro inkluzivas lerno- kaj legolibrojn, aŭdividan materialon k.a. Nuntempe li finredaktas du pliajn gravajn verkojn, nome **Brazila Esperanta Parnaso** (kunlabore kun Neide Barros Rêgo) kaj **Praktika Vortaro de Esperanto**.

# Konkurso

## “IZOLITECO... FORVIŜU ĈI IDEON!”

ILEI-br eldonas la revuon *Brazilei* kun la celo helpi kaj kuraĝigi kursgvidantojn de Esperanto en la malfacila sed plezuriga tasko instrui. Sed por fari tion nepras, ke vi helpu nin ekkoni la situacion de Esperanto-instruado en kiel eble plej multaj partoj de la lando.

Respondu al la ĉisuba demandaro kaj poste kompletigu la frazon:

**“Taŭge instrui estas...”**

*La unua plej bona frazo gajnos DVD-on de **Gerda Malaperis** - la filmo.*

*La dua plej bona frazo gajnos ekzempleron de la libro “**Manual de Sobrevivência do Professor Particular** [de Línguas]” de eldonejo Disal.*

*La tria plej bona frazo gajnos **T-ĉemizon** de ILEI-br kun polikromia serigrafio.*

### DEMANDARO

*Nomo:*

*De ĉiam vi instruas?*

*Kie vi instruas?*

*Ĉu la grupo havas aliron al interreto?*

*Kiu(j)n instruilo(j)n vi uzas?*

*Konsisto de viaj ĉursanoj: ( ) infanoj ( ) adoleskantoj ( ) plenaĝuloj*

Adreso por ricevo de presitaj novaĵoj de ILEI-br:

**Strato:**

**Urbo:**

**Ŝtato:**

**Telefono:**

**Retadreso:**

Sendu vian respondon per poŝto (vidu adreson en la kolofono) aŭ per interreto (revuo@ileibr.org). La rezulto de la konkurso aperos en la venonta numero de *Brazilei* kaj en la retejo de la Brazila ILEI-Sekcio.

# Kontaktu kun la Mondo!

ISSN 0023-3692

**Kontakto** estas la plej legata junuleca revuo pri landoj, popoloj, kulturoj, socioj kaj politiko - por gejunuloj kaj ĉiuj kiuj estas junaj en la koro.

**Kontakto** aparte taŭgas por instruistoj kaj komencantoj: parto de la artikoloj aperas en la lingvaĵoj "facila" kaj "tre facila".




**Kontakto** estas varia kaj amuza - interesaj por ĉiuj!

**Kontakto** aperas ses-foje jare. Abonu rekte de UEA aŭ pere de via kotizperanto.

Nun **Kontakto** haveblas ankaŭ en la interreto, pere de la reta Jarlibro de UEA.

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu ĉe [www.uea.org](http://www.uea.org) aŭ skribu al [sekretario@co.uea.org](mailto:sekretario@co.uea.org)!

NUMERO



# Feliĉan Novjaron al ĉiuj geinstruistoj!

Porinfana kurso en Charqueada/SP



**ilei BR**  
www.ileibr.org